

2024.3.29 Belgio

Bonan tagon, sinjoro Hori.

Kaj dankon por tiuj informoj.

Kiam mi legas tion, mi pensas :

Neniu en ĉi tiu rakonto estas anĝelo. Ĉiu havas ion por riproĉi al si. Kaj ni simplaj civiluloj povas nur aŭskulti la amaskomunikilaron, kiuj faras propagandon por sia registaro. Sed la milito daŭras kaj ni ne estas petita pri nia opinio.

Mi ankaŭ ŝatus diri ion al vi. Mi estas belga. Kaj la 25-an de marto mi iris al festo donata de kurdaj rifuĝintoj. Ili kutime festas sian novan jaron la 21-an de marto, samtempe kun printempo. Ĉi-jare, en Belgio, ili decidis festi ĝin la 25-an de marto en Loveno, en herbejo.

Mi estis tie kaj ĉio iris bone. Estis kurdaj familioj kun siaj infanoj kaj iliaj aĝuloj. Evidente, ĉie estis flagoj kun la foto de Abdullah Ocalan. Sed....Por ili, li reprezentas la personon, kiu sciis ilin defendi kaj kiu de jaroj estas enfermita kaj eble eĉ mortinta en turka malliberejo. Ĉio iris bone. Mi eĉ lernis danci kurdan dancon. Ili aŭskultis muzikon kaj manĝis kvankam la plimulto el ili estas islamanoj. Ne estis bataloj tie. Mi foriris sufiĉe frue. Ĉirkaŭ 4:30 p.m. Kaj kion mi lernu poste?

Ke kurda familio revenanta hejmen salutis dekoj da turkoj, kiuj batis ilin, inkluzive de maljunulo. Mi ankaŭ eksciis, ke belga amiko, kiu hejmenportis kurdan familion, ankaŭ estis atakita de turkoj. Tiuj turkoj kritikis ilin precipe pro la flagoj kun la foto de Abdullah Ocalan kaj pro tio ke ili manĝis tage dum Ramadano. Mi legis informojn, kie oni parolas pri unu mortinto kaj 5 grave vunditaj.

Kaj nia Ĉefministro venas en la belga televido por nur akuzi la kurdojn pri ĉi tiuj teruraĵoj, dirante, ke ili estas teroristoj dum la turkoj estas bonaj homoj.

Mi devas diri ĝin: mi vere naŭzas. Precipe kiam ni scias, ke nuntempe, tiuj samaj turkoj bombas la kurdojn kaj deturnis riveron por ke ili ne plu havu akvon. Mi pensas, ke la kurdoj ne estas teroristoj. Ili simple devas defendi sin. Ĉi tiu situacio estas tre maljusta. Amike, Viviane Tits.

2024.3.29 ベルギー

堀さん、こんにちは。そして、その情報をありがとう。それを読むと、次のように思います。この物語には誰も天使ではありません。誰もが自分への非難すべき点を持っています。そして私たち一介の民間人は、政府のプロパガンダを行うメディアの言うことしか聞くことができません。しかし戦争は続いており、私たちは意見を求められません。

私もあなたに一言申し上げたいと思います。私はベルギー人です。そして3月25日、クルド人難民のお祭りに行きました。彼らは通常、春と一致する3月21日に新年を祝います。今年、ベルギーでは3月25日にルーヴェンの草原で祝うことに決めました。

私はそこにおいて、すべてがうまくいきました。子供たちと年長者を連れたクルド人家族もいました。明らかに、アブドラ・オジャランの写真が掲げられた旗がいたるところにありました。しかし...彼らにとって、彼は彼らを守る方法を知っていて、何年も監禁され、おそらくトルコの刑務所で死亡したことさえある人物の代表です。全てが上手く行きました。クルド舞踊も習いました。彼らのほとんどがイスラム教徒であるにもかかわらず、彼らは音楽を聴き、食事をしました。そこでは争いはなかった。私は午後4時30分頃 帰りました。そして次は何を知ったと思いますか？

帰宅したクルド人家族を出迎えたのは、数十人のトルコ人たちで、老人を含めて暴行を受けたことです。また、クルド人の家族を連れて帰ったベルギー人の友人もトルコ人に襲われたことも知った。これらのトルコ人は、特にアブドラ・オジャランの写真が描かれた旗と、ラマダン期間中に日中に食事をしていたという事実を批判した。1名が死亡し、5名が重傷を負ったという情報を読みました。

そして我が国の首相がベルギーのテレビに出演し、クルド人はテロリストであり、トルコ人は善良な人々であると言って、クルド人を非難しました。

言わなければなりません：私は本当にうんざりしています。特に現在、同じトルコ人がクルド人を爆撃し、川を迂回させてクルド人に水が行かないようにしていることを知ったときはなおさらです。私はクルド人はテロリストではないと思います。彼らはただ自分自身を守らなければならだけです。この状況は非常に不公平です。ヴィヴィアン・ティッツ。

Saluton sinjoro Jasuo.

Kiel ni ĉiuj scias, Ruisio en pasintaj 50 jarojn KOSTANTE havis iun militojn en Afgánistán, Ĉeĥio, Hungario, Rumanio, Kartvelio, Nagorny Karabah, Moldavio, Iĉkerio, Sirio, Malí, SudAfrika respubliko kaj tiel plu. Se oni demandas kial ? Por dispecigi ilin kaj pli facile forrabi. Kialon pór du militoj en Iĉkerio estis facile akirebla nafto! Same en Sirio.

Neniu Usona armeo uzurpis rusajn teritoriojn, nek de iun european landon! Sed kiam rusaj soldatoj venas al iu ajn lando, en iu ajn kontinento komencas rabado kaj murdado! Multaj de ili venis nur pór marodi ! Kaj rusa milito en ukrainaj teritorioj ne estas escepto. Forŝtelitajn televidilojn, lavmaŝinojn, telefonojn, juvelaĵojn de murditaj familioj oni sendis al RF. Autojn kaj agrikulturaj meĥanizmoj, grenon de kampoj sur okupitaj teritorioj rusoj marodis malkaŝe kaj senhonte.

Aparta tragédie estas ĉe forŝtelitaj infanoj, kiuj en filtraciaj tendaroj oni forprenis de patrinoj kontraŭ ilia volo (plej juna estis ses monata). Dum longa periodo en RF estis plej malalta naskiĝpovo en tuta mondo. Kaj senĉesaj militoj malbone influas al demografia situacio. Sekve nun moskva reĝimo ŝtelas infanojn de najbara lando.

Kaj iomete pri simboloj. En kelkaj dokumentoj pri la dua Mond'milito oni povas vidí, ke faŝisma reĝimo ofte uzis grandan literon V kiel sia simbolo en okupita Prago. Saman simbolon nun uzas moskva diktatoro. Kaj tio tute ne estas hazardo. Pollando kaj Ĉeĥio esploras rusan spionan reton, kies agado estas direktita kontraŭ landoj de Eŭropa Unio. Belgio anoncis, ke Moskvo subaĉetis kelkajn europajn deputitojn pór ke ili disvastiĝu dezinformaciojn.

RF atakis elektrocentrojn en tuta Ukrainio. Al teritorio de Rumanio alflugis rusaj milit'dronoj. Aer'fortoj de kelkaj landoj de NATA estis aktivigitaj. Estis likvidita ankoraŭ unu rusa bomb'aviadilo.

Necesas pliĝustigi kelkajn trajtojn pri pafado en koncerta halo. Denové pri sia respondecu anoncis terorisma organizaĵo Islama Ŝtato. Sed rusaj inform'kanaloj tion ignoras ! Certe ili ricevis ordonon en Kremlo. En rapotaĵo estis videble, ke arestitaj homoj havas spurojn de fortaj batoj kaj turmentoj. Do ili povas subskribi ĉion, nur pór turmentoj finiĝu. Jam kelkfoje aperis informoj el diversaj landoj pri taĝikoj, kiujn polico arestis pro preparataj sabotaĵoj. Kaj ĉiuj tiuj aferoj NE HAVAS iujn rilatojn al Ukrainio. Interalie, sendependaj usonaj kaj ĉeĥaj analitikistoj eblecon pri ukrainaj kontaktojn kun la incendio ege dubis. Ukrainio ĉiujn insinuojn de rusa propagando negacas. Olga

Hodiaŭ (la 31an de marto) estis atakoj al Odeso, Mykolajiv, Hersono.

Rusaj agenturoj varbas homojn el Singapuro kaj Vjetnamio al laboro en Rusio. Pro perado de laboro oni pagas ĉirkau 3 mil dolarojn. Sed post alflugo al RF, de homoj ili

forprenas telefonojn, pasportojn kaj devigas subskribi unujaran kontrakton kun armeo. Pri tiuj okazoj informis ankau Arabaj Emiratoj. Olga

こんにちは、ヤスオさん。

周知のとおり、ロシアは過去 50 年間、アフガニスタン、チェコ共和国、ハンガリー、ルーマニア、グルジア、ナゴルヌイ・カラバ、モルドバ、イッケリア、シリア、マリ、南アフリカ共和国などで常に戦争を繰り返してきた。理由を尋ねると？ 彼らをバラバラにし、強盗しやすくするためです。イッケリアでの 2 つの戦争の理由は、石油を入手するのを簡単にしたかったからです。シリアでも同様だ。アメリカ軍はロシアの領土を略奪したことはありませんし、ヨーロッパのどの国も侵犯していません。しかし、ロシア兵がどこの国でも、どの大陸でも行くと、略奪と殺人が始まるのです！ 彼らの多くはただ略奪するためにやって来たのです！ そして、ウクライナ領土におけるロシアの戦争も例外ではない。盗まれたテレビ、洗濯機、電話、殺害された家族の宝石類がロシアに送られました。ロシア人は公然と恥知らずにも、占領地の畑から自動車や農業機械、穀物を略奪した。特に悲劇的なのは、濾過収容所で母親の意志に反して連れ去られた、盗まれた子供たちのことである（最年少は生後 6 か月）。ロシアでは長い間、出生率が全世界で最も低かった。そして絶え間ない戦争は人口動態に悪影響を及ぼします。したがって現在、モスクワ政権は隣国から子供たちを盗んでいるのです。

そして、シンボルについて少し。第二次世界大戦に関するいくつかの文書では、ファシスト政権が占領下のプラハで大文字の V をシンボルとして頻繁に使用していたことがわかります。同じシンボルが現在、モスクワの独裁者によって使用されている。そしてそれは決して偶然ではありません。ポーランドとチェコ共和国は、欧州連合諸国に向けて活動を行っているロシアのスパイネットワークを調査している。ベルギーは、モスクワが偽情報を広めるために一部の欧州議員に賄賂を贈ったと発表した。

ロシアはウクライナ全土の発電所を攻撃した。ロシア軍の無人機がルーマニア領土に飛行した。一部の NATO 諸国の空軍が発動された。また 1 機のロシア爆撃機が排除された。

コンサートホールでの銃撃問題も正す必要があります。再度テロ組織「イスラム国」は犯行声明を出した。しかし、ロシアのニュースチャンネルはそれを無視しています！ きっと彼らはクレムリンの命令を受けたのだろう。上方によると、逮捕された人々には強い殴打や拷問の痕跡があることが判明した。したがって、彼らは苦しみが終わるためだけに、何にでも署名します。妨害行為を準備したとして警察に逮捕されたタジク人に関する情報が各国から何度か出てきた。そして、それらすべてはウクライナとは何の関係もありません。とりわけ、アメリカとチェコの独立系アナリストは、ウクライナ人とこの事件との接触の可能性を疑っていた。ウクライナはロシアのプロパガンダのほめかしをすべて無視している。

今日（3月31日）、オデッサ、ムィコラジウ、ヘルソンへの攻撃がありました。ロシアはシンガポールとベトナムからロシアで働く人材を募集している。仕事の斡旋料として約 3 万円が支払われます。しかし、ロシアに着陸した後、彼らは人々の携帯電話とパスポートを取り上げ、軍との 1 年間の契約に署名することを強制しました。アラブ首長国連邦もこれらの事件について報告した。 オルガ

La 10a de aprilo

Zhenja Amis “Oni simple ne planas...” Vivi en Ukrainio dum milito (ĉerpita el la revuo LUMO de Montrealo)

Ĵenja Amis

4月10日 ジェンジャ・アミス「計画がないだけです...」 戦時中のウクライナでの暮らし (モントリオールの LUMO 誌より抜粋) ジェンジャ・アミス



Mi rigardas la fotojn el nia vizito al Ukrainio, en 2012. Tio estis la lasta vizito de mia edzo Joel kaj mi al Ukrainio. Mi mem poste vizitis en 2018 kaj 2019, por aranĝi ĉion por la translokiĝo de mia patrino al Kanado. Pasis jam pli ol jardeko de tiu bela vojaĝo en 2012, sed mi sentas, ke pasis ne jardeko, sed jarcento... Jen, sur la fotoj, la bela grupo de esperantistoj de ĉiuj aĝoj, ridetantaj kaj feliĉaj. Ni manĝas kuketojn alportitajn de ni el Kanado, kaj diversajn Ukrainajn bongustaĵojn. Ni trinkas teon (la nepra parto de ĉiuj Esperantokunvenoj en Ukrainio). Ni amuzas nin per rol-ludoj, ni rakontas pri Kanado, montras fotojn, ridas. Se iu dirus al ni tiam, ke ekzakte post 10 jaroj Ukrainio plonĝos en militon, ni neniel kredus...

私は 2012 年にウクライナを訪れたときの写真を見えています。これが夫のジョエルと私にとって最後のウクライナ訪問でした。その後、2018 年と 2019 年に私自身も訪れ、母のカナダへの引っ越しの準備を整えました。2012 年のあの美しい旅から 10 年以上が経ちましたが、10 年ではなく 1 世紀が経ったような気がします... この写真には、笑顔で幸せそうな、あらゆる年齢の美しいエスペランティストのグループが写っています。私たちはカナダから持ってきたクッキーやさまざまなウクライナの珍味を食べました。私たちはお茶を飲みました (ウクライナでのエスペラント語の会議には欠かせないものです)。私たちはロールプレイを楽しんだり、カナダについて話したり、写真を見せたり、笑ったりしました。もしそのとき誰かが、ちょうど 10 年以内にウクライナが戦争に突入するだろうと私たちに告げたとしたら、私たちはそれを信じなかっただろう...

La du junuloj - Svitlana kaj Roman — estas ĉarma paro, kiu eĉ fondis la junularan klubon, kiun ni vizitis en 2012. Ili aktiviĝis jam post kiam mi elmigris el Ukrainio en 2005, do, mi ne konis ilin antaŭ mia foriro. Ni estas amikoj en Fejsbuko, kiu tiam kaj tiam “manĝigas” al mi fotojn de tiu bela paro, jen grimpanta la montojn, jen sur la fonoj de ekzotikaj pejzaĝoj tie kaj jene en la mondo. Roman estas profesia turisma gvidanto. En la lasta foto, kiun mi vidis, kaj kiu frapis min, estis Roman vestita per milita uniformo, la unuan tagon kiel servanto en la armeon...

二人の若者、スヴィトラナとローマンは魅力的なカップルで、2012 年に私たちが訪問したユースクラブを設立したこともありました。彼らは私が 2005 年にウクライナから移住したあとで活動していたので、出発するまでは彼らのことを知りませんでした。私たちは Facebook の友人であり、彼らは時折、

山を登り、世界中のあちこちのエキゾチックな風景を背景にしている美しいカップルの写真を私を楽しませてくれました。ローマンはプロのツアーガイドです。最後に見た写真で印象に残ったのは、軍服を着たローマンで、軍務員としての初日だった…。

Tio ne devas esti surprizo, ja ĉiu viro en Ukrainio nun povas esti vokita en la armeon, ja oni vivas en milita tempo, sed ial tio estis ŝoko vidi lin vestita milite. Tio estis eble antaŭ kelkaj monatoj. Kaj jen imagu mian ĝojon kaj surprizon, kiam mi legis, ke Svitlana skribis al mi pri sia vizito al Montrealo! Ŝi venis kun du infanoj – 9-jara Diana kaj 11-jara Boguslav – por ĉ. sessemajna vizito al Kebeko, kun mallonga tempo Montreale. La montrealaj esperantistoj renkontiĝis en sia kutima loko, Resto Végo, por bonvenigi ilin kaj aŭskulti ŝian rakonton pri la situacio en Ukrainio, fine de februaro 2024. La postan tagon ni ankaŭ iom promenis Montreale — vizitis mian laborejon: la Nacian Filmoficejon, kie ili aparte aprezis la pupojn el animaciaj filmoj kaj la tablofutbalon. Sed tie ĉi mi parolos ne pri nia agrabla montrealumado, sed pri tio, kion Svitlana rakontis al ni pri iliaj vivoj en Ukrainio.

それは驚くべきことではありません。結局のところ、私たちは戦争の時代に生きているのですから、ウクライナでは誰もが軍隊に召集される可能性があるのです。しかし、何らかの理由で、彼が戦争用の服を着ているのを見るのはショックでした。それはおそらく数か月前のことでした。そして、スヴィトラーナがモンリオール訪問について私に手紙を書いたのを読んだときの私の喜びと驚きを想像してみてください。彼女は2人の子供（9歳のダイアナ君と11歳のボグスラフ君）を連れて、6週間のケベック訪問とモンリオール滞在でした。2024年2月末、モンリオールのエスペ란ティストたちは、いつもの場所であるレスト・ヴェゴに集まり、彼らを歓迎し、ウクライナ情勢について彼女の話の話を聞きました。翌日、私たちはモンリオールを散歩し、私の職場を訪問しました。国立映画オフィスでは、アニメーション映画の人形やテーブルフットボールが特に高く評価しました。しかし、ここで私が話すつもりなのは私たちの楽しいモンリオールでの観光ではなく、スヴィトラーナが私たちに語ったウクライナでの生活についてです。

Do mi proponas ŝian rakonton, iom miksitan kun mia propra voĉo. “Estis eraro... ĉio baldaŭ finiĝos” En la komenco, neniu kredis ke milito okazos. Eĉ kiam Rusio havis la armeon apud la landlimo kun Ukrainio, homoj en Ukrainio ne kredis, ke la sekvan tagon okazos invado kaj milito, rakontas Svitlana. Mi mem rememoras ankaŭ la frazon de mia amiko kaj antaŭa samlernejano: “La surteriĝo de eksterteranoj sentiĝus pli verŝajna ol milito kun Rusio...”. Oni ne povis imagi, ke Rusio, la lando, kun kiu oni havas tiom fortajn ligojn familiajn, kulturajn, lingvajn, volos neniigi nin... La rusa lingvo estas ofta lingvo por multegaj Ukrainianoj. Ni plejparte kreskis en dulingva medio, ofte kun gepatroj jen de ukraina, jen de rusa origino, kun la geavoj loĝantaj jen en Rusio por pluraj personoj el Ukrainio, kaj jen en Ukrainio por multaj personoj el Rusio (kiu estas ankaŭ la kazo de Svitlana). “Kiam la milito komenciĝis, ni vere pensis, ke estas iu eraro. Tuj kiam oni komprenos, ke estas eraro, ĉio finiĝos”, konfesas Svitlana. Por multaj – inkluzive de mi – tiu milito sentiĝas kiel plej abomeninda perfido...

そこで私は、私自身の声を少し混ぜて、彼女の話を紹介します。「間違いでした…すべてはすぐに終わるとおもったのは」最初は誰も戦争が起こるなどとは信じていませんでした。ロシアがウクライナとの国境近くに軍隊を駐留させていたときでさえ、ウクライナの人々は翌日に侵攻と戦争が起こるとは信じていなかった、とスヴィトラーナは言う。私自身も、友人で元学友の「宇宙人の上陸のほうが、ロシアとの戦争よりもありそうな気がする…」という言葉を感じている。私たちと家族、文化、言語の面でこれほど強い結びつきを持っている国であるロシアが、私たちを殲滅したいと思っていたとは想像もできませんでした... ロシア語は多くのウクライナ人にとって共通語です。私たちは主にバイリンガル環境で育ちました。両親はウクライナ人、時にはロシア出身であることが多く、祖父母の数人はウクライナ人でロシアに住んでおり、多くのロシア人はウクライナに住んでいます（スヴィトラーナの場合も同様です）。「戦争が始まったとき、私たちは何かの間違いだ」と本気で思いました。「間違いがあることが理解されればすぐに、すべてが終わります」とスヴィトラーナは思っていました。私を含む多くの人にとって、この戦争は最も忌まわしい裏切りのように感じられます...

La plej bonaj falis unue... Svitlana diras, ke ĝuste en la unuaj monatoj kaj unua jaro de milito oni perdis la plej bonajn individuojn de la lando. La eliton. La intelektulojn. Ĉar militservi volontulis ĉiuj, tre ofte ankaŭ personoj de tutlanda renomo: aktoroj, atletoj, ĵurnalistoj, muzikistoj... kaj simple ĉiuj, kiuj sentis ke estas ilia devo iri kaj defendi la landon... Unu el tiuj personoj estis mia antaŭa samklasano el la lernejo. Mi legis pri lia morto en la novaĵoj. Li estis atleto kaj organizanto de konata komunuma atleta konkurso... Elektropendoj

この国の優秀な人材が戦争で失われました。最初の数か月、初めの位置ねんで最も有能は人たちを失いました。エリート。知識人。なぜなら、誰もが軍隊に志願したからであり、多くの場合、俳優、スポーツ選手、ジャーナリスト、ミュージシャンなど全国的に有名な人々も含まれます...そして国を守ることが自分たちの義務であると感じていたすべての人たちです...それらの人々の1人は私の学校の前のクラスメート。彼の死をニュースで読みました。彼はアスリートであり、有名な地域運動競技会の主催者でした...

Se estas unu angla vorto, kiu eniris en la ĝeneralan vortprovizon de ĉiu persono en Ukrainio inter la malfrua 2022 kaj la frua 2023, ĝi estas la vorto “blackout” – elektrohalto. En Kijivo la elektro jen estis, jen ne estis, alternante plimalpli ĉiujn kvar horojn. Oni devis do bone plani sian vivon, komunikadon, retumadon, hejmtaskojn, lernej-laborojn, kuiradon kaj ĉion alian ĉirkaŭ la periodoj de elektro kaj senelekto. Oni lernis vivi laŭ tiu horaro. Svitlana rakontas, ke unu fojon ŝi estis kaptita en lifto, ankoraŭ 10–15 minutojn antaŭ ol la senelektriĝo devis okazi laŭ la horaro. Ŝi diras, ridetante, ke jen ŝi praktike lernis, ke la horaroj ne estas ekzaktaj, sed nur proksimumaj. Bonŝance, ŝia edzo Roman revenis kaj aŭdis ŝiajn frapojn kaj la vokojn por helpo. Li trovis en jutubo videon pri kiel malfermi la lifton, kaj ŝi eliris el la lifto, starante meze inter la du etaĝoj. Svitlana diras, ke ne estis danĝere, kaj ke nuntempe en Kijivo la senelektrigoj ne okazas – aŭ okazas malofte, bonŝance...

2022 年後半から 2023 年初頭にかけて、ウクライナのすべての人々の一般語彙に入った英語の単語が 1 つあるとすれば、それは「ブラックアウト」、つまり停電という言葉です。キエフでは、電気が点いたり消えたりしており、ほぼ 4 時間ごとに切り替わりました。そのため、人は電気がある期間とない期間に合わせて、生活、コミュニケーション、ウェブサーフィン、宿題、学業、料理、その他すべてのことを計画しなければなりませんでした。私たちはそのスケジュールに従って生きることを学びました。スヴィトラーナさんは、予定通り停電が起こるまで 10 ~ 15 分前にエレベーターに閉じ込められたと語ります。彼女は、スケジュールは正確なものではなく、おおよそのものに過ぎないことを実際に学んできた方法だと笑いながら言いました。幸運なことに、夫のローマンさんが戻ってきて、ノックの音と助けを求める声を聞きました。彼はエレベーターの開け方についての YouTube 動画を見つけ、彼女はエレベーターから降りて、2 つのフロアの真ん中に立っていました。スヴィトラーナさんは、危険ではなかったし、現在キエフでは停電は起きていない、あるいは幸運にも滅多に起こらないと言う。

La infrastrukturo damaĝita Aparte en la komenco de la invado, multaj objektoj de la urba infrastrukturo en diversaj urboj, kaj, kompreneble, ankaŭ en Kijivo, estis damaĝitaj. T.e., la lokoj, kiuj provizas kaj purigas la akvon, generas kaj distribuas la elektron, ktp. Tio ege malfaciligas la ĉiutagan vivon. Dum Svitlana parolas pri tio, mi rememoras la kanadan ŝtormon de printempo 2023, kiu trafis Orientan Kanadon, kiam ni mem perdis elektron por iom da tempo... Estas nur en tiaj momentoj, kiam ni memoras, en kiom komfortaj kondiĉoj ni loĝas, kiam ni perdas tion, eĉ nur por kelkaj horoj aŭ kelkaj tagoj... Mi aldonu, ke tiuj damaĝoj de la infrastrukturoj ne estis hazardaj — ili estis zorge planitaj, por trafi ekzakte tie, kie ĝi plej doloras kaj trafos kiom eble plej multe da homoj...

インフラの損傷 特に侵攻の初期には、さまざまな都市、そしてもちろんキエフでも都市インフラの多くの物体が損傷した。つまり、水の供給と浄化、電気の生成と配電などを行う場所です。これにより、日常生活が非常に困難になります。スヴィトラーナがこれについて話しているとき、私はカナダ東部を襲った 2023 年春のカナダ嵐を思い出しました。そのとき私たち自身もしばらく停電しました... 私たちがどれほど快適な環境で暮らしていたかを思い出すのは、そのような瞬間だけです。たとえそれが、たとえ数時間や数日間であっても... 付け加えておきたいのは、これらのインフラへの被害は偶然ではなく、最も被害が大きかった場所を正確に攻撃し、できるだけ多くの人に被害を与えるために、慎重に計画されたものであるということです。

La vivo kun haltoj Kiam oni aŭdas la sirenon, oni devas iri al la plej proksima ŝirmejo por kaŝiĝi de aeratako. Tio estas la rutino por ĉiuj loĝantoj de la lando. Kiam oni observas rusan aviadilon, eĉ tute fore, eĉ ekster la limoj de la lando, oni anoncas la eblan atakon. Se oni estas en transporto, oni devas eliri el ĝi. Se oni estas en la lernejo aŭ infanĝardeno, universitato, laborejo aŭ kiu ajn alia loko, oni iras suben por kaŝiĝi, kaj oni restas tie ĝis la minaco estas for. Do, oni iom al kutimiĝis al la interrompoj al la ĉiutaga vivo. Oni estas preparita por tio — kun poŝtelefonoj plene ŝargitaj, kromaj poŝtelefonaj ŝargiloj, etaj lampoj, manĝetoj... “Kijivo estas nun la plej sekura urbo en Ukrainio, sed certe ne 100- procente, ĉar estas milito”, diras Svitlana. Tuj I poste ŝi

aldonas, ke nur 5 km de ŝia domo falis restaĵo de raketo, kiu damaĝis domojn kaj mortigis 7 homojn... Eble, la vorto “sekura” estas tre relativa...

停止のある生活。サイレンが聞こえたら、空襲から身を隠すために最も近い避難所に行かなければなりません。これはこの国のすべての住民にとっての日常です。たとえ遠く離れていても、たとえ国境の外であっても、ロシアの飛行機を観察すると、攻撃の可能性を知らせることになります。輸送中の場合は、車から降りなければなりません。学校、幼稚園、大学、職場、その他の場所にいる場合、階下に隠れて、脅威がなくなるまでそこに留まります。それで、人は日常生活の中断に少し慣れました。そのために備えられているのは、携帯電話はフル充電され、予備の携帯電話充電器、小さなランプ、軽食などです...「キエフは現在、ウクライナで最も安全な都市ですが、もちろん 100 パーセントではありません。戦争があるからです」とスヴィトラナさんは言う。その直後、彼女は自宅からわずか 5 キロのところにロケット弾の残骸が落下し、家屋が損壊し、7 人が死亡したと付け加えました。おそらく、「安全」という言葉は非常に相対的なものなのかもしれません…。

Familioj dividitaj Post nia kunveno kun Svitlana, mi metis kelkajn fotojn en Fejsbukon. Ŝi sidis apud unu el niaj klubanoj, kaj mi memoras, ke unu amiko skribis: “Bela familio”. Mi devis klarigi, ke la persono apud ŝi ne estas ŝia edzo – kaj ke ŝia edzo Roman estas en la armeo (homoj de militserva aĝo ne rajtas foriri el la lando)... La edzo de Svitlana, Roman, studis medicinon – kaj eĉ se li laboris nelonge laŭ sia medicina fako (epidemiologio), li tamen estis prenita en la armeon kiel kuracisto, kun la rango de leŭtenanto. La realo de pluraj familioj en Ukrainio estas ke ili estas dividitaj. La viroj estas en la armeo — ĉu volontule, aŭ vokite...

家族の分裂。スヴィトラナとの面会后、私はフェイスブックに写真を投稿した。彼女は私たちのクラブメンバーの隣に座っていましたが、友人の一人が「美しい家族」と書いたのを覚えています。私は、彼女の隣にいる人は彼女の夫ではないと説明しなければなりません - そして彼女の夫のローマンは軍隊にいます（兵役年齢の人は出国できません）... スヴィトラナの夫、ローマンは医学を勉強しました - そしてたとえ彼が医学部（疫学）で短期間働いたとしても、それでも彼は医師として陸軍に採用され、階級は中尉であった。ウクライナのいくつかの家族は分裂しているのが現実だ。男性たちは軍隊に所属しています - 自発的に、あるいは召集されて...

Pluraj virinoj kaj infanoj foriris el la lando. Fakte, esperantistoj bone organiziĝis por helpi al rifuĝintaj ukrainianoj. La plejparto de esperantistoj el Ukrainio tamen restis en Eŭropo, sed mi konas kelkajn, kiuj iris ankaŭ al Ameriko. Svitlana diras, ke en Ukrainio ŝi diplomiĝis pri la franca kaj la angla, sed ke antaŭ la milito ŝi ne multe uzis la francan. Sed tio evidentiĝis ege utila, kiam ŝi iris loĝi kun la gefiloj en Francio. Kompreneble, la franca tre utilas ankaŭ nun, vizitante Kebekion. (Svitlana rakontas, ridante, ke ŝia gastiganta familio en Francio trovis bonan manieron lerni la ne-tro-facilan-por-neslavo-nomon de ŝia filo: Boguslav, kiu estis ĉarme nomita “Beau-gosse-slave” – bela slava knabo, en la franca lingvo). Ŝiaj infanoj ankaŭ iom parolas la francan, kaj eĉ iris al la lernejo en Francio. Sed... la prezo de tiu sekureco estas apartiĝo de la Mapo de la milito,

je la fino de januaro 2023. 33 familioj... Mi demandis al la infanoj, kiu estas ilia plej ŝatata loko en la mondo. Diana respondas senhezite, Ukrainio...

女性と子供を連れて国外に出た女性もいる。実際、エスペ란ティストはウクライナ難民を助けるためによく組織されていました。ウクライナ出身のエスペ란ティストの大多数はヨーロッパに残りましたが、私はアメリカに行った人も何人か知っています。スヴィトラーナさんは、ウクライナではフランス語と英語で卒業したが、戦前はフランス語をあまり使っていなかったという。しかし、それは彼女が子供たちと一緒にフランスに住むことになったときに非常に役立つことがわかりました。もちろん、フランス語もケベックを訪れる今ではとても役に立ちます。(スヴィトラーナさんは笑いながら、フランスのホストファミリーが、息子の非スラブ人にとってはあまり簡単ではない名前、ボグスラフを知る良い方法を見つけたと語った。ボグスラフは魅力的に「ボーゴス・スラブ」と呼ばれていた -美しいスラブ人の少年、フランス語で)。彼女の子供たちはフランス語も少し話せ、フランスの学校にも通っていました。しかし...その安全の代償は、2023年1月末に戦争の地図から離れることです。33家族...私は子供たちに世界で一番好きな場所はどこなのかと尋ねました。ダイアナはためらうことなく「ウクライナ…」と答える。

Laceco instaligās Post la komenca sento de socia devo, kiam pluraj personoj voluntulis por la armeo, nun, pli ol du jarojn poste, laceco instaligis. Tiu sento de laciĝo eĉ pliiĝis post la longe atendata, sed apenaŭ sukcesa, kampanjo de kontraŭatakado, pasintaŭtune. Kompreneble, la granda parto de tiu kulpo pezas sur ni, la Okcidento, kiu ne sufiĉe provizis per armiloj... Sed la realo estas, ke la homoj, kiuj voluntulis militservi antaŭ du jaroj, volas – kaj devas – iom ripozi, kaj la kvanto de volontuloj nun ne sufiĉas por liberigi la personojn, kiuj batalas, tro laciĝitaj, dum tro longa tempo... La vivo daŭras Oni ne povas esti en streĉo pri milito la tutan tempon. La homoj iras al kinejoj, kafejoj, kunmanĝas, kuntrinkas, babilas kaj kunridas, diras Svitlana. Rigardante tion de ekstere, oni eble povus foje iluzie pensi, ke fojfoje oni forgesas, ke estas milito. Sed jen la milito revenas en la konversacio, ĉar ĉies amikoj kaj familianoj estas jen en la armeo, aŭ jen tiam kaj tiam venas la sono de sireno kaj la tempo kaŝiĝi, se estas antaŭvidita atako... Svitlana notas ankaŭ la ŝanĝiĝojn en la kulturo — aparte de la populara kulturo. La kantoj pri la milito kaj la sopiro pri la amatoj, iom kiel tiuj dum la Dua Mondmilito, estas parto de la nuna kulturo kaj arto en Ukrainio. Alia parto estas danki la armeon en la komenco de ĉiuj eventoj. Jen ni estas en tiu bela teatro (kinejo, kafejoj), komfortaj, kaj ni estas dankemaj al la armeo, kiu batalas, por ke ni povu ĝui tiun belan tagon (vesperon) ktp. Oni ne faras planojn...

疲労が始まる。人々が軍隊に志願したとき、最初は社会的義務を感じていたが、2年以上経った今、疲労が始まっている。昨秋、待望されたもののほとんど成功しなかった反撃キャンペーンの後、その疲労感はずっと増した。もちろん、責任の大部分は十分な武器を提供しなかった西側諸国にあります...しかし現実には、2年前に志願兵役に就いた人々は少し休みたい、そしてそうしなければならないのです。ボランティアの数は、あまりにも長い間、疲れ果てて戦っている人々を解放するのに十分ではありません...人生は続いています。戦争について常にストレスを感じることはできません。人々は映画館やカフェに行き、一緒に食事をし、一緒に飲み、おしゃべりし、一緒に笑います、とスヴィトラーナは言います。これを

外から見てみると、時々戦争があることを忘れてしまうのではないかと妄想的に思うことがあるかもしれない。しかし、その後、戦争の話が再び話題に上がります。なぜなら、皆の友人や家族が軍隊に入っているからです。あるいは、攻撃が予見された場合、時折サイレンが鳴り、隠れる時が来るからです...スウィトラーナはまた、次のように述べています。文化、特に大衆文化の変化。第二次世界大戦中の歌に似た、戦争と愛する人への思慕を歌った歌は、現在のウクライナの文化と芸術の一部となっています。もう一つの部分は、すべての出来事の初めに軍に感謝することです。ここで私たちは美しい劇場（映画館、カフェ）にいて、快適で、その美しい日（夜）などを楽しむために戦ってくれる軍隊に感謝しています。何も計画は立てられません...

Iu saĝulo diris, ke, se oni volas ridigi Dion, oni rakontu al Dio siajn planojn. Do, en Ukrainio nun oni simple ne planas. Ĉar neniu scias, kiel aferoj iros kaj kio okazos morgaŭ. Dum ni promenis en la Malnova Urbo, mi memoras Svitlanan diranta, “nu, ni ne scias, kio alia okazos en Eŭropo, poste”. Jes, post la milito en Ukrainio, aŭ eble dum ĝi. Ĉu la milito estos lokita en Ukrainio, aŭ ĉu ĝi saltos preter la ukrainajn limojn kaj plonĝigos ankaŭ alian parton de Eŭropo en militon? Tristaj pensoj... Kio poste? Garry Evans demandis, kiel Svitlana vidas la solvon de la milito. Malfacila demando. Kompreneble, oni ne konas la respondon... Eĉ se Ukrainio (espereble) gajnos, ne estas klare, kiel la lando povas reintegrigi. Ekzemple, kiel la orienta parto (Donbaso, Lugansko) povus unuiĝi kun la cetero de la lando – pri tio mi dubas, persone... Kaj krome, kun tiom da vivoj perditaj por defendi ĉiun centimetron, la investo de la lando estas tro alta por konsideri la cedon de certaj teritorioj interŝanĝe al la ĉeso de la milito... Finaj pensoj Mia koro doloras. Mi volas reveni en la tempo, antaŭ tiuj 12 jaroj, kaj trinki teon kaj manĝi kuketojn, ludante rol-ludojn kaj rakontante pri Kanado. Mi volas ke Svitlana kaj Roman, la infanoj, estu kune, kaj ke unu tagon ili vizitu Montrealon ĉiuj kune, kvarope. Mi volas ke ili estu sekuraj kaj ne devu fari korŝirajn elektojn. Mi provas foje kompreni, ĉu la mondo rompiĝis en unu momento, aŭ estis pluraj etaj rompiĝoj, kiuj okazis tiam kaj tiam, kiuj fine alĝvidis al tiu situacio. Mi revas, ke unu tagon mi vekiĝos por konstati, ke la milito estis nur koŝmaro, malbona sonĝo...

ある賢者は、神を笑わせたいなら、自分の計画を神に告げるべきだと言いました。しかし、ウクライナでは今、まったく計画がありません。なぜなら、物事がどのように進み、明日何が起こるかは誰にも分からないからです。私たちが旧市街を歩いているとき、スウィトラーナが「まあ、次にヨーロッパで何が起こるかわかりません」と言ったのを覚えています。はい、ウクライナ戦争後、あるいは戦争中かもしれません。戦争の舞台はウクライナになるのか、それともウクライナの国境を越えてヨーロッパの別の地域も戦争に突入するのか。悲しい考え...次はどうする？

ギャリー・エヴァンスは、スウィトラーナが戦争の解決策をどのように考えているか尋ねました。難しい質問ですね。もちろん、答えは分かりません...たとえウクライナが（できれば）勝利したとしても、どうやって国家を再統合できるかは明らかではありません。たとえば、東部（ドンバス、ルガンスク）がどうやって国の他の地域と団結できるのか、個人的には疑問です...それに加えて、1センチを守るために非

常に多くの命が失われているため、国の投資は多すぎて検討できません。戦争終結と引き換えに特定の領土を割譲すること…

最後の感想 心が痛いです。12 年前に戻って、お茶を飲んだり、クッキーを食べたり、ロールプレイング ゲームをしたり、カナダの話をしたりしたいです。私は子供たちのスヴィトラーナとローマンが一緒になって、いつか 4 人揃ってモントリオールを訪れることを望んでいます。私は彼らが安全であり、悲痛な選択をしなくて済むことを望んでいます。私は時々、世界が一瞬にして崩壊したのか、それとも時々小さな崩壊がいくつか起こって、最終的にあの状況に至ったのかを理解しようと努めます。私は、いつか目が覚めて、戦争はただの悪夢、悪い夢だったと気づくことを夢見ています…

Kaj mi volas ke esperantistoj – kaj ĉiuj homoj de la mondo – konsentu pri almenaŭ unu principo: ke la vivo de ĉiu persono estas sankta kaj neprenebla, kaj ke la devo de ĉiu persono estas esti instrumento por la paco.

そして私は、エスペ란ティストたち、そして世界中のすべての人々に、少なくとも 1 つの原則に同意してもらいたいと考えています。それは、すべての人の人生は神聖で譲渡できないものであり、すべての人の義務は平和の手段であるということです。

